

Iam lucis orto sidere

Brevier-Himno

Ordinara tempo > 2-a kaj 4-a semajno > jaŭdo > matena laŭdo

*Iam lucis orto sidere,
Deum precemur supplices,
ut in diurnis actibus
nos servet a nocentibus.*

Jam levas sin la taga lum',
ni petu Dion en humil',
ke Li ĉe nia dev-plenum'
do gardu nin de malutil'.

*Linguam refrænans temperet,
ne litis horror insonet:
Visum fovendo contegat,
ne vanitates hauriat.*

La langon bremsu Li per brid',
ke bruu ne kverel-horor';
l' okulojn kontraŭ vana vid'
Li zorge kovru en favor'.

*Sint pura cordis intima,
absistat et vecordia:
Carnis terat superbiam
potus cibique parcitas.*

En kor-intimo regu pur',
foriĝu ĉia van-sugest',
l' orgojlon de la hom-natur'
detruu vivo en modest'.

*Ut cum dies abscesserit,
noctemque sors reduxerit,
mundi per abstinentiam
ipsi canamus gloriam.*

Do, kiam pasis for la tag'
kaj nokto venis laŭ la ord',
per virtaj penso, vorto, ag'
ni Dion laŭdu en akord'.

*Deo Patri sit gloria,
eiusque soli Filio,
cum Spiritu Paraclito,
nunc et per omne sæculum.*

Al Dio Patro estu glor',
al Lia unu-nura Fil',
al la Spirito la honor'
kaj nun kaj ĉiam en jubil'.

Amen.

Amen.

latina T: 8-a jarcento.
aŭ eble de Ambrozio el Milano,
2001 en ADORU 113

E: Guido Holz 1986*,
2001 en ADORU 113